

POLA ESPERANTISTO

(Esperntysta Polski)

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ.

Redakcio kaj Administracio: Widok 19, Warszawa.

Abono: 1/4 jare 1.50 zł., 1/2 j. 3 zł. jare 6 zł., Eksterlande egalvaloro

Konto en P. K. O. Nr. 11.025

La Redakcio ne resendas manuskriptojn — konservu kopion.

Redaktoro kaj eldonanto:

STANISŁAW KAROLCZYK

PROTEKTOROJ:

Prof. Dr. Odo Bójwid, Jan Kostecki, Dr. Emiljan Loth.

SIBTENANTOJ:

Inĝ. Roman Iwo Dobrzański, Antoni St. Stankiewicz.

HELPANTOJ:

Dr. Ignacy Dziezic, Włodzimierz Miernicki.

ENHAVO:

Mowa Leo Belmonta. — M. DE-WICZ: Panporcio. — M. T.: La konferenco en Locar. o. — Zamenhofaj solenoj. -- 18-a Universala Kongreso de Esperanto. — E. F. C.: Bibliografio. — Ze ŝiata esperanckiego. — P. T. E.: Komunikat Nr. 2.

Niaj subtenantoj:

Nia gazeto, privata eldonaĵo de la Redaktoro, bezonas la bonvolan materialan helpon de tiaj polaj esperantistoj por kiaj ĝia progreso estas kara kaj kies cirkonstancoj tion permesas. Ju pli da subtenantoj anoneiĝos des pli enhavoriĉa, luksa kaj pli efika estos la „Pola Esperantisto“.

unika esperanta revuo por poloj.

La nomojn de la subtenantoj ni ĉiam presas sur la unua paĝo de la kovrilo.

Fariĝi Protektoro, Subtenanto aŭ Helpanto de „Pola Esperantisto“ povas ĉiu persono, kiu enpagos monate po Zł. 80, 15 aŭ 5.

Subtenantoj ricevos sen plua pago 2 ekzemplerojn de la gazeto.

Eldono de la

“Pola Esperantisto”

Widok 19, Warszawa.

Kunvenoj de Pola Esperanto-Asocio

Warszawa, Królewska 19.

Ĉiamekrede je 8 ĝis 10 h. vespere. La kancelario kaj biblioteko funkcias ĉiamekrede kaj sabate de 7.30 ĝis 9 h. vespere.

Abonu kaj abonigu por Via gazeto!

POLA ESPERANTISTO

(Esperantysta Polski)

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ.

JARO XX.

Warszawa, Majo 1926

Nr. 5 (123)

Mowa Leo Belmonta,

wygłoszona podczas odsłonięcia pomnika
Dr. L. L. Zamenhofa.

Żałobni, a bodaj wcale nie żałobni Słuchacze... bowiem zgromadziliście się tu wobec prochów znikomości, wobec symbolów śmierci — imieniem życia Wielkiej Myśli, imieniem Nieśmiertelnej Nadziei na zbratanie ludów stoicie tu wzruszonym wieńcem głów dookoła niezwyklej — nadzwyczajnej mogiły... Bo niemasz takiej drugiej na tym cmentarzu i takiej drugiej niemasz na wszystkich okólnych cmentarzach tej okolicy. — I nie znajdzie się podobna na wszystkich cmentarzach tej ziemi. I długoby wypadło szukać jednakięj na wszystkich cmentarzach świata.

Bo ten skromny grobowiec ozdobiony jest niespotykanym na innych pomnikach cmentarnych, olbrzymiej wagi symbolem — kształtem *kuli ziemskiej*; a nikt nie zaprzeczy z obecnych tutaj dziś, nikt wogóle nie zaprzeczy jutro, że ten symbol należy się *temu*, kto snem nieprzespanym śpi w tej mogile, kto dobroczynnem tchnieniem swej wynalazczej myśli ogarniał świat cały. Są na świecie mogiły dostojne, do których przez wieki całe pielgrzymują ze czcią i miłością tłumy, ale wiąże je zwykle bądź jedna religja, bądź jedność krwi plemiennej. Ale ten pomnik, ideą bogaty, jest przez to jedyny, że powstał z ofiarnych składek ludzi różnych wyznań i różnych narodowych pochodzeń. I wiem to z pewnością, czytając w księdze przyszłości, że podwyższony on kiedyś będzie sumptem wdzięcznych narodów i z prawa dźwignie się ponad inne... Jako z pewnością wiem, że dnia pewnego, w czas powszechnego esperanckiego kongresu w stolicy tej Rzeczypospolitej — pociągną tu, ku zdumieniu Warszawy, z wieńcami w rękach, z zielonymi sztandarami, przy dźwiękach hymnu „Esporo“ liczni delegaci z pobliskich i z dalekich krajów, aby złożyć hołd wdzięczności prochom *Ludwika Zamenhofa* — tłum, znacznie liczniejszy, niż dziś. Jest to więc

miejsce szanowne i niezwykcyjne, bo przeminą długie, długie lata — a im dłuższy będzie ich szereg, tem więcej cudzoziemców przybywających do stolicy Polski, a mogących rozmówić się z kulturalną jej ludnością w neutralnym języku międzynarodowym Esperanto, dopytywać się będzie o drogę do tej mogiły. Zechcą bowiem przed tym pamiątkowym kamieniem w milczeniu czci wyrazić swoją wdzięczność za to, że, chociaż obcy goście, przyjęci zostali tu jako bracia, których się rozumie. I wolno mnie, jednemu z pierwszych uczniów Mistrza, z pierwszych przyjaciół jego myśli, jednemu z ostatnich z pierwszej plejady wiernych, — (gdyż inni najbliżsi jego dzieła szermierze już śpią snem wiecznym na pobliskim cmentarzu rzymsko-katolickim: Antoni Grabowski, Zakrzewski, Brzostowski, Waśniewski...) — wolno mi rzucać z całą powagą tę przepowiednię. Bo przecież przed laty blisko 40, gdy twór nieśmiertelny Zamenhofs pojawił się dopiero w szacie polskiej i nie przełożony był jeszcze na języki kulturalne Zachodu, gdy otaczało go jeszcze zimne milczenie, a nazajutrz napotkać miała drwina ślepych i głuchych — jam już naówczas jaenowidczo przepowiedział Mistrzowi zwycięstwo: *Vi venkos, Sinjoro, vi venkos*. Wtedy, kiedy taką boleścią ścisnęła się jego pierś, kiedy rzucał obojętnemu światu tę przepiękną pieśń dumnej męki i nadziei: „O moja myśli, męko maja, Nadzieje i gorycze, llem wam złożył cichych ofiar, ja sam już nie policzę... Jeśli me trudy, męki na nic, los każe, iż zmarnieją — Przyjdź śmierci zaraz weź bez bólu... Daj konać mi z nadzieją.“

I dzisiaj to zwycięstwo — wbrew wszelkim sprzeciwom — jest rosnącym stale jak lawina faktem... Albowiem gałęzie czarodziejskiego drzewa Esperantyzmu, którego potężne korzenie wyrosły z gruntu naukowej filozofii wszystkich języków, już poszumem liści rzuciły śpiewne nuty swoje w dal bezmierną; na brzegi Atlantyku, Oceanu Spokojnego, — na zielone wybrzeża Anglii i na kwitnące zatoki Francuskie — na Kongresowe place wielkich miast Europy i szczyty Alp Szwajcarskich — na olbrzymie mury Waszyngtonu, na ulice stołeczne Paryża i Londynu, Moskwy i Berlina; trafiły do serc gorących zwolenników w Japońskim Jeddo i w Indyjskim Bombaju — do Meksyku i do Brazylii — do Sydney i Egiptu; szumiały pieśnią entuzjastyczną „Esporo“ wśród tłumów, przybyłych na 17 kongresów z najodleglejszych punktów kuli ziemskiej — i dzwonią nad pięknymi równinami ziemi mazowieckiej jako zadzwiewały tu przed chwilą w momencie uroczystym odsłonięcia pomnika Mistrza przy udziale gości zagranicznych, pod opieką dostojnych władz polskich. I stał się cud jeszcze za życia Mistrza, boć cudem było, że ten dobroduszny człowiek, ten dziwnie cichy i

skromny w życiu lekarz-okulista — trafił dzięki dziełu swemu do środowisk najwyższej kultury zachodniej, odbierał na świecie szerokim hołdy niemal królewskie... Bowiem na jego to cześć w starożytnym Cambridge defilował szwadron jazdy i składało mu hołdy Ciało Akademickie, w Paryżu ku jego czci, gdy jechał z Prezydentem, dźwięczała Marsyljanka, a Rzeczpospolita darzyła go Krzyżem Legji Honorowej, w Hiszpanji król ofiarował mu order Izabelli Katolickiej, w Bernie za błogosławieństwem Papieża mowa jego brzmiała w świątyniach z kazalnicy; w Antwerpji studenci wyprzęgali konie z powozu i wieźli go wraz z Małżonką w porywie radości do gmachu kongresowego, a w Krakowie w dni VIII Kongresu szły tłumy za jego przewodem z hymnem *Espero* na ustach na starożytny Wawel i składały na Rynku zielone chorągwie *Esperanta* na kamieniu pamiątkowym *Kościuszki* — zaś w kopalniach *Wieliczki* zapalały się dlań wszystkie światła, jako w dni przyjęcia monarchy.

Spełniając zaszczytną misję moją w uroczystej chwili odsłonięcia pomnika *Mistrza*, wygłaszając tę przemowę w imieniu *wszystkich Towarzystw Stolicy Polski* — nie mogę na miejscu snu *Zmarłych* i w ograniczonym z konieczności czasie ani kreślić w pełni duchowego wizerunku *Mistrza*, ani szeroko tłumaczyć walorów dzieła, które zyskało mu tak wielką chwałę. Ani mogę malować one drogi cierniowe trudu i poświęcenia, któremi szedł do grobu *Sławy*, długoletnie boje *Genjuszu* zmuszonego — jak zawsze — porać się z ciemnotą i złą wolą. Ani mogę opisywać ciężką czarę goryczy, którą pojony był nawet w godzinach uznania — te ciernie wijące się wśród kwiatów — ten zawód bolesny, który sprawił, że w dni bratobójczej wojny narodów Jego serce, serce szermierza *Pokoju* i *Miłości* nie wytrzymało — i pękło. Więc tylko skreślę *Dzieło* i *Twórcę* w paru słowach. On był tym, który dał ludzkości zasobnej w materialne środki komunikacji — *duchowy telegraf*. Wspólne słowo dla stosunków międzynarodowych, drugi pomocniczy język obok ojczystego — kosmopolityczną złotą oprawę dla brylantu mowy rodzimej. On był tym, który w swój neutralny język włożył serce polskie — nasz akcent na przedostatniej sylabie, t. j. rytm duszy polskiej w języku — przedtem jedynym, dziś znanym i drogim całemu światu *esperanckiemu*. On był tym, który spełnił przedchrystusowe marzenia proroków *Izraela*, *Cefanjaszów* i *Jezanjaszów* o zbrataniu ludów jedną mową — był tym, który zniósł klątwę legendy biblijnej, mieszając języki hardo-pobożnemu pokoleniu, dźwigającemu w pysze ku niebu wieżę *Babel*. Był on według słów znakomitego matematyka *Franc.*, *Carlo Bourlet* „*Kopernikiem* w dziedzinie mowy ludzkiej“. Zaciekle walczył przesądów masowych przeciw niemu tsej najwybiniejszym świadectwem Jego *genjuszu*: Bowiem



Monumento de D-ro L. L. Zamenhof post la malkovro. Sur la bildo ni vidas prof. D-ron Odo Bujwid, s-ron Stanisław Essigman, s-ron Antoni Stankiewicz, s-ro Leo Belmont, s-ro Mieczysław Lubelski k. a.

dzieło, którego dokonał, którego pomimo prób większe od niego umysły, w rodzaju Leibniza, Woltera, Paskala, Ampera dokonać nie były w stanie—dzieła, które przyprawilo o szaleństwo mnóstwo mniejszych jego poprzedników, — to dzieło było oczywiście tak trudnem, tak wielkiem — że tłumy uznały je wprost za niemożliwość. On jednak stworzył to, co wydawało się zgoła niemożliwością. — naprzeciw językom naturalnym, tworzonym przez wieki i narody, postawił język swój, cudownie łatwy, sztuczny, stworzony trudem życia jednego genialnego umysłu. Ale pomimo zapoznania od strony nie znoszących żadnej genialnej nowości mas, był to niewątpliwie najbardziej, czczony i kochany z pośród wielkich ludzi naszej epoki — boć żaden inny znakomity mąż nie stykał się tak bezpośrednio z czcicielami z tylu rozmaitych narodów i nie był taką miłością zwolenników swoich na obu półkulach świata otoczony. Był on też jedynym człowiekiem, który doczekał się za życie pięknego pomnika w Franzensbadzie.

Wierzajcie mej napoły zuchwałej przepowiedni, że ten Człowiek, który tak chlubnie zaświadczył o udziale Polski w wielkim kulturalnym ruchu ludzkości, za lat sto będzie miał pomniki we wszystkich stolicach świata.

(Polesper)

Sincere mi al vi konsilas Postŭchaj mej serdecznej de Tu Ciu Nian. rady.

Sincere mi al vi konsilas:

Ne ŝparu vian veston oran!

Sincere mi al vi konsilas:

Ŝparegu la junecon floran!

Deŝiru florojn ĝustatempe! —

Ho, ne prokrastu la detranĉojn

Ĝis kiam floroj plu ne estos

Kaj vi eltiros vane branĉojn!

Fontsuno Caj, Tientsin.

Postŭchaj mej serdecznej rady:

Nie ŝzanuj swoich złotych szat!

Postŭchaj mej serdecznej rady:

Młodości oszczędz tylko
kwiat!

W właściwym czasie kwiaty
rwij!

Aż zwiędną, ach, nie czekaj!

Młodości piękny sen dziś śnij,
Z zerwaniem ich nie zwlekaj!

Tłom. H. W.

„Panporcio“

**el antaŭ nelonge pasintaĵ travivaĵoj
en Rusujo,**

La frosta decembra tago proksimiĝis al tagmezo. En la granda ĉambro de fervoja direkcio sidis dekelkaj personoj kaj sumigis longajn vicojn da ciferoj, krakigante per ostetoj de kalkuliloj. Meze de la ĉambro staris negranda fera forneto malvarma pro manko de brulligno. Sur la muroj kaj plafono videbliĝis postsignoj de antaŭa hejtado en formo de griznigraj makuloj de fulgo. Estis malvarme kaj oficistoj laboris, vestitaj en ŝafpeltoj kaj veltŝuoj. La vizaĝoj de ĉiuj estis deprimitaj, laboro plenumiĝadis senzorge. Oni aŭdis fragmentojn de paroladoj, kompreneblaj nur por interparolantoj.

— La salon hodiaŭ oni vendas po kvin mil...

— Sed kie oni vendas? en bazaro estas malpermesite, mi vidis neniun vendiston hodiaŭ...

— Vi eble volus, ke vendistoj alportu ĝin ĉi-tien?

Se vi volas aĉeti, iru straton Gruzinan, en la domo tri-dek kvina demandu pri Lubimov... sed estu singardema kaj ne prokrastu... Oni diris, ke vendrede forveturos vagonaro

kun laboristoj al Krasno por pogranda aĉeto de provizaĵo. Provu—eble ili permesos al vi veturi kune.

En alia grupeto oni diskutis pri loko, kie oni povas aĉeti pli malkare terpomojn, sekalon, porkaĵon..

— Sergejev diris al mi, ke li ricevis pasintsemajne en Krasno kvar pudojn da sekalo kaj tri sakegojn da terpomoj interŝanĝe je paro da botoj, tri pecoj da sapo, kaj dekkvin funtoj da salo.

— Bonegel sed al Krasno oni devas piediri dek du verstojn flanken de la stacidomo...

— Nu, kion fari?— pli proksime vilaĝanoj jam ne volas interŝanĝi por salo aŭ ordinaraj objektoj; ili nun postulas oraĵojn, veluron kaj similajn aĵojn. Vi ja bone scias, ke ĉiutage centoj da urbanoj venas al ili, proponante divers-specajn objektojn. Pro tio ili fariĝis malfacile kontentigeblaj.

Pli malpli similaj interparoloj oni povis aŭdi ĉie: en oficejoj, en troplenigitaj vargonaroj, en privataj loĝejoj. Ŝajnis, ke homoj en la ĉefurbo ĉesis interesiĝi pri aliaj aferoj krom tiu de provizaĵo, kiun oni povis ricevi nur de vilaĝanoj kaj nur interŝanĝe por salo aŭ diversaj objektoj bezonaj por kampuloj.

El inter ĉiuj oficistoj nur unu Aleksandro Vasiljeviĉ ne partoprenis en interparoloj, sed sumigis atente ciferojn. La maljuna jam homo, kun malbrilaj okuloj kaj vizaĝo kvazaŭ farita el vakso, li estis opiniata kiel homo el alia mondo.

Iam bonhumora, aŭ imitanta lerte bonhumoron, li neniam kaj pri nenio plendis, kontraŭe li penis eltrovi ian ŝercan flankon en ĉiu okazo de tiama malfacila vivo. Oni diris, ke li iam estis tre riĉa komercisto kaj perdis ĉion en daŭro de kelkaj tagoj dum la revolucia ĥaoso, sed li mem neniam pri tio parolis. De kiam li komencis labori ĉe nia oficejo, ni donis al li la alnomon „ŝerculo“.

La oficeja servisto Petroviĉ alportis la tekruĉon kun bolanta akvo kaj, ridetante nerimarkeble, solene anoncis:

— La teo estas preta!

La oficistoj silentis, nur rigardante de tempo al tempo, ĉu kiu ajn ne preparas teon. Sed neniu rapidis. Fine unu demandis:

— Kamaradoj, kiu el vi havas teon?

Neaj respondoj ekaŭdiĝis el ĉiuj flankoj.

— Ho! neniu? — ŝerceme ekkriis la demandanto.

— Nu, kion fari! — se vi havas nek nigran, nek verdan teon, ni trinku la „blankan“! Estos eĉ pli bone, almenaŭ ni ne perdos vizaĝkoloron. Ĉu ne vere Aleksandro Vasiljeviĉ?

— Vere! vere! — respondis la demandito.

— Laŭ opinio de Aleksandro Vasiljeviĉ ĉio estas bonega — enmiksi sin al interparalo la alia.

— Ĝustel — daŭrigis la maljunulo — ĉu estas malbone

al ni? ni sidas en vasta ĉambro... kun tri gradoj da varmo en ĝi... — interrompis iu.

— Bagatelol! ni ja havas ŝafpeltojn. Ni baldaŭ trinkos la teon... akvon, diru pli ĝuste, kaj sen sukero... —ree interrompis tiu.

— Ankaŭ sensignife. Sukero ĝenerale influas malbone je sano, kaŭzante aperadon de vermoj en stomako...

Tiaj ŝercaj diskutoj kun Aleksandro Vasiljeviĉ ripetigadis ofte.

Kiam la oficistoj komencis sian matenmanĝon, konsistantan el glaso da varmega akvo kun peco da pano sekala, mi ĵus revenis el la kabineto de ĉefestro, kiu ordonis al mi skribi urĝan cirkuleron, do mi rapide eltrinkis mian „blankan“ teon, ekmanĝis la panon kaj komencis pretigi necesajn dokumentojn por cirkulero. Subite mi rememoris, ke ĵus manĝita peco da pano estis ĉe mi la lasta, kaj ke mia edzino adiaŭante min antaŭ la forveturo en la oficejon diris al mi:

— Mia karulo, hodiaŭ nepre alportu panon. Vi ja scias, ke ni jam ne havas la farunon por baki panon. La tagmanĝon mi preparos el fungoj, kiujn mi kolektis kaj sekigis dum aŭtuno. Mi havas ankoraŭ iom da lardo, do mi fritos la fungojn kun terpomoj. Vi vidos, ke ĝi estos luksa manĝaĵo, sed pano, vi mem scias, estas nepre bezona.

Jes, mi tre bone sciis, ke ĝi estas bezona... Sub influo de pensoj pri ĉi-tiu bezoneco, mi forgesis urĝan laboron kaj komencis konsideri kiamaniere oni povus akiri la panon.

Por aĉeti ĝin en bazaro oni ne povis pensi, ĉar unu funto kostis koin mil rublojn, kaj mia monata salajro ne superis dudek mil. Ne eble... sed kion fari?..

Mi devas klarigi, ke ni fervojoficistoj same kiel aliaj ŝtatlaboristoj havis rajton ricevadi senpage el ŝtata bakejo po unu funto da pano ĉiutage, sed ĝuste tiutempe okazis ia interrompo en importo de faruno kaj bakejoj dum la tuta semajno jam ne liveradis al ni panon ordinaro nomitan „panporcio“.

Mi ekpensis, ke eble hodiaŭ io ŝanĝiĝis kaj tial mi ekdemandis kolegojn ĉu ili ne scias ion pri panporcio. Okazis, ke dum mia foresto la bakejo telefonis, sciigante pri hodiaŭa disdono de pano

— Nur la bakejo avertis, — diris Aleksandro Vasiljeviĉ — ke ĉiu ricevanto alvenu kun saketo.

— Kun saketo? — mi miris — sed ĉiu sen averto ja alvenas kun saketo. Ĉu ili donos tiom multe da pano? eble ili aldonos la porciojn de pasinta semajno?

— Ne kamarado. La saketoj estas bezonaj ŝajnas pro tio, ke la pano estas bakita el ĉia miksitaj faruno — li aldonis iom nedifinite.

Evidente atendis nin iu malagrabila surprizo, sed mankis la tempo por diveno — oni devis labori.

Kiam post la fino de la laboro ni ricevis niajn panporciojn, ĉio klariĝis.

En ŝtataj bakejoj ekmankis faruno, sed ĉar oni nepre devis disdoni panporciojn, almenaŭ al laborista parto de la popolo, do la proviziga komitato ordonis, ke centra magazeno sendu al bakejoj la tutan provizon de diversspeca faruno. Plenumi tiun ordonon ne estis facile, ĉar magazeno havis nur avenon kaj grajnoj de sunfloro (tiu ci lasta estas tre ŝatata popola frandaĵo). Konsiderinte, ke el tiu „greno“ oni ja povas fari farunon, estraro de la magazeno siaflanke ordonis: mueli ĉion kune kaj ricevitan farunon dissendi al bakejoj. Sed oni forgesis ĝin kribri.

Bakita el tiu miksaĵo pano havis du neantaŭviditajn bonajn ecojn: dum tranĉado ĝi dispeciĝadis (ne forgesu pri saketoj!) kaj pro multego da akraj avenosunfloraj ŝeloj estis nemangĝebla.

Reveninte hejmen, mi penis eviti la rigardon de mia edzino, sed ŝi ekvidinte la „panon“ nur ridetis malgaje kaj diris:

—Ne ĉagrenu karulo! ni mangos niajn fungojn sen pano...

M. De-wicz

La konferenco en Locarno.

Dum la pasinta Pasko okazis, kiel ni anoncis en la marta numero, la kunveno de Internacia Centra Komitato, Konstanta Rerezentantaro kaj Universala Esperanto—Asocio.

Alvenis ĉirkaŭ kvindek personoj el dekkvin eŭropaj landoj kaj unu el Japanujo

Oni diskutis pri diversaj punktoj de la tagordo nome pri kongresoj, konferencoj, radio, komerco ktp. La konferenco ankoraŭ unufoje pruvis la neceson havi centron de nia movado. Tial tiu samideana sento, kiu ligas la naciajn societojn kun niaj centraj organizoj, plifortiĝis kaj la bazo, sur kiu ni entreprenas ĉiujn paŝojn, celitajn al esperantigo de la mondo, plifirmiĝis. Ni kredu, ke niaj gvidantoj rekuraĝigitaj per la gravaj decidoj, alprenitaj en Locarno, gvidos nian movadon ĝis la fina venko.

Tamen la ĉefa afero plej interesanta la polan samideanaron estas tiu de la regularo de K. R. En Locarno okazis kunsido de K. R., dediĉita preskaŭ speciale al la franca — pola protesto, direktita kontraŭ alpreno de la regularo de K. R. en Genève. Koncerne tiun aferon en Locarno regis vere la atmosfero de repaciĝo. Kiel indikas la oficiala protokolo de la kunsido, unu post

la alia diversaj principoj estas unuanime akceptitaj, do oni decidis, ke 1-e la financa jaro de K. R. estu la kalendara jaro, 2-e la oficoj de la estraranoj estu honoraj, 3-e estu enkondukita en la regularon punkto pri kontrolo de la financoj de K. R. kaj I. C. K. 4-e la estraranoj estu elektataj per skriba voĉdono, 5-e ĉiuj proponoj antaŭ ilia alprenado estu diskutataj.

Polan Esperanto-Asocion reprezentis s-ro René Dubois, ĉar la pola delegito ne povis veturi Lokarnon.

Poste oni elektis S-ron Schoofs kiel presidanton kaj S-ron Petiau kiel sekretarion-kasiston.

Oni konstatis, ke la repaciĝo estas tute atingita. Pri tio ni tute ne dubis, ĉar malgraŭ ke la vidpunktoj de ambaŭ flankoj estis eble aliaj, oni laboris kaj faris ĉiujn entreprenojn nur por bono de la esperantistaro. M. T.

Zamenhofaj solenoj.

La 14-an de aprilo Pola Studenta Esperantista Societo — Warszawa aranĝis vesperon por honorigi memoron de Zamenhof. Parolis D-ro Antoni Czubyński kaj s-ino Engènie Cense.

La 18-an de aprilo sur la hebrea tombejo okazis malkovro de la Zamenhofa monumento, dum kiu ĉeestis reprezentantoj de la pola registaro, urbestro de Warszawa, esperantistaj organizoj kaj multaj samideanoj.

Malkovris la monumenton dum kantado de „La espero“, rajtigita de la Internacia Centra Komitato prof. Odo Bujwid. Antaŭe prenis la voĉon s-ro Stanisław Essigman, kiu parolante en la nomo de la Loka Monumenta Komitato, dankis la delegitojn. „Tiu ĉi soleno estas ne nur soleno de Polaj Esperantistoj, sed de la tutmonda Esperantistaro. Nia Internacia Por — Zamenhofa Monumenta Komitato, apogante sin sur la

bazo, ke ĉiu Esperantisto havas la rajton partopreni en la starigo de la monumento sur la tombo de l'Majstro, ne profitis de la okazo, ke la elspezon povus preni sur sin unu aŭ kelkaj entuziasmoj de nia ideo, sed anoncis subskribcion en esperantaj gazetoj. La rezulto estas tia, ke en ofer-donoj partopronis 62 esperantistaj grupoj, apartenantaj al 84 landoj, dissemnitaj sur la kvin mondpartoj. Tial sur la dekstra flanko de la monumento estas prave gravurite: „Starigita de Tutmonda Esperantistaro“.

„Ĉi tiu monumento skulptita en Skotlanda granito, estas farita en Aberdeen, en Skotlando laŭ la projekto de Pola artisto s-ro Mieczysław Lubelski, laŭreato de nia konkurso, anoncita de nia Komitato en Warszawa en 1923 j. Por tiu konkurso niaj artistoj elsendis 18 modelojn. Dum la skulptado de la monumento en Aberdeen, zorgis

membroj de la internacia Komitato, loĝantaj proksime de tiu ĉi urbo, niaj Estimataj Samideanoj, Sroj Page, Warden kaj Applebaum. Dank'al klopodoj de Brita Esperanto - Asocio kaj afabla subteno de Sinjoro Ministro Skirmunt, nia ambasadoro ĉe Lia Reĝa Moŝto Reĝo de Granda Britujo, nia Registaro liberigis nin de doganaj kaj importaj impostoj, faciligante al ni per tio nian taskon. Por ĉi tiu subteno kaj formalaj faciligoj, ni sentas la bezonon esprimi en tiu ĉi momento, al ĉiuj institucioj kaj personoj, nian profundan dankon. Esperante, ke laŭ la fortoj kaj rimedoj, ni plenumis nian taskon, mi turniĝas al Vi, Sinjoro Delegito de Centra Komitato kun la propono, bonvolu afable malkovri la monumenton."

Kiam falis la ŝirmilo la ĉeestintoj ekvidis grandan monumenton, skulptitan en malhela ŝtono, preskaŭ severan pro manko de iuj ornamaĵoj, super kiu vidiĝis granda kuglo, simboliganta la tutan mondon.

Poste prenis la parolon la reprezentantoj. Delegito de la Registaro Sro Ministro D-ro T. Grabowski, esprimis dankemcon al esperantistoj, ĉar ili dum la tempoj de la pola malliberigo, kiam eksterlande oni ne multe sciis pri Polujo, per bonaj kaj belaj tradukoj esperantaj el Pola literaturo enpenetris en la plej malproksimaj anguloj de la mondo. La afero de la reciproka alproksimiĝo de popoloj, interpaciĝo de nacioj, eltrovo de rimedoj por malhelpo al armi-

gitaj konfliktoj interesigas la tutan mondon kaj la Ligo de Nacioj realizigas tiujn penojn. La ideologio de Esperanto servas al la samaj celoj, kaj la esperantista movado jam nun multe faris kaj multe utilas per reciproka interkompreniĝo kaj alproksimiĝo de la popoloj.

Prof. Schor, granda rabeno de Warszawa, s-ro Mayzel en la nomo de la ĉefurba konsilantaro, D-ro Bychowski en la nomo de ĉiutpola kuracista asocio esprimis siajn homaĝojn.

Poste parolis reprezentantoj de esp. societoj: s-ro Leon Fencowicz (Pola Esperanto Asocio grupo Warszawa), Prokuroro Roman Sakowicz (Pola Esp. Asocio grupo Wilno), s-ino Root (amerikaj esperantistoj), s-ino Essigman (esperantistoj en Gdańsk), s-ro Jerzy Woźnicki (T. E. A. J.), D-ro Krenicki (Konkordo), s-ro Domosławski (Laboro), s-ro Zysman (A.E.R.), s-ino Fe's (esp. societo en Lwów), D-ro Goldberg (esp. societo en Białystok) k. m. a. Vic-delegito de U.E.A. en Warszawa, s-ro Ant. Stankiewicz, metante la florkronon diris: „En la nomo de Universala Esperanto-Asocio mi esprimas ĉi tie la vortojn de homaĝo al cindroj de D-ro Zamenhof, nia neforgesebla Majstro. La kruela periodo de mondmilito forprenis Lin el inter ni... Nun ni estas denove kunigitaj kaj ni gvidos pluen Vian grandan faron, Majstro! Kaj, kiel signon de homaĝo, sub Vian Monumenton mi ĵetas ĉi tiujn florojn!

Mi ĵetas florojn sur la monumenton Vian

sur Vian monumenton,
Kaj gvidos pluen Vian grandan
faron,
plenumos testamenton!

La solenon finis bonega pa-
rolado de s-ro Leo Belmont,
kiun ni aperigas in extenso.

La saman tagon vespere oka-
zis en loĵojo de gesinjoroj Za-
menhof solena kunveno.

La solenon komencis dekla-
mo de s-ino Cense. Sekve pa-

rolis s-ro Belmont, Dro Leon Za-
menhof, s-ino Root.

La muzika parto konsistis el
kantoj de f-ino Marja Frene-
lówna, s-ino Ocetkowska, kiu
prezentis kantojn de Bethoven
kaj Schubert esperante, s-ro
Gołębiowski.

La malkovrita monumento
estu por ni plej kara simbolo
de la laboro por bono de la ho-
maro.

18-a Universala Kongreso de Esperanto

en Edinburgo.

Loka Kongresa Komitato. Hon.
Prezidanto: John Merchant.
Prezidanto: W. M. Page, S. S. C.
Vic-Prezidantoj: William Rae,
S-ino G. Senior. Sekretarioj: J.
M. Warden, F. F. A., L. K.,
William Harvey, I. S. O., L. K.
Kasisto: David R. Tullo, S. S. C.
Komitatanoj: F-ino Jane Baird,
George Dickinson, David Ken-
nedy, M. A., Robert Stevenson.

Adreso por leteroj. Sekretarioj,
18-a Kongreso de Esperanto,
Edinburgo, Skotlando.

Aliĝiloj. Disdonitaj pere de
Gazetoj (Januara kaj Februara)
kaj de Naciaj Asocioj. La L. K.
K. kore dankas la redaktorojn
pro ilia helpo. Nericevintoj bon-
volu peti aliĝilon rekte de la
sekretarioj. Tiuj, kiuj intencas
aliĝi, bonvole ne prokrastu.

Kotizo. 20 ŝilingoj Britaj=
proksimume 20 Ger. Rmk., 25
Svis. fr., 12 Nederl. guld., 5
Uson. dol. Oportuna maniero
sendi la kotizon, estas per Brita
ŝtatbileto por 1 („currency

note, one pound“), havebla ĉe
bankoj en multaj urboj, kaj
sendota per registrita (rekomen-
dita) letero.

Somera Universitato. Senpage
por ĉiuj Kongresanoj. La fama
Franca Sciencisto Prof. Charles
Richet skribas jene: „Mi estos
tre fiera esti *honora prezidanto*
de la Somera Univ. rsitato de
l'Esperantista Kongreso en Edin-
burgo. Mi havas nur unu beda-
ŭron, ke mi ne povos ĉeesti“.

Pasportoj. Ĉe ne-Brita ano
vojaĝanta al la Kongreso el
fremda lando bezonos naciajn
pasporton. Irontoj el Francujo,
Belgujo, Luksemburgo, Hispa-
nujo, Nederlando, Italujo, Svi-
sujo, Svedujo, Norvegujo, Da-
nujo, kaj Islando ne bezonos
vizojn. Anoj bezonantaj vizojn
sin turnu al plej proksima Pas-
porto-Kontrolisto, aŭ Brita Kon-
sulo. Ĉiu kunportu dokumen-
tojn por certigi al la Enmigrada
Oficisto, kiu renkontas la ŝipon

ĉe Brita haveno, ke la celo de la vizito estas la Kongreso.

Mendiloj por Loĝado, k. t. p. Jam senditaj al kongresanoj, k. t. p. Nericevintoj bonvolu peti mendilon rekte de la sekretarioj. Jen estas la tarifoj por loĝado:

Tarifo A. Lito kaj matenmanĝo en privata domo, pensionejo, aŭ hotelo: po 5, 5½, 6, 7, 8, ĝis 15 ŝilingoj por ĉiu tago.

Tarifo B. Lito, matenmanĝo kaj vespermanĝo en granda pensionejo, aparte rekomendata de la Loka Kongresa Komitato: po 9 aŭ 11 ŝilingoj por ĉiu tago.

Tarifo C. Tre malkara aranĝo por loĝado—komforta sed ne luksa—en grandaj ĉambroj de lernejo, provizitaj per apartaj litoj, taŭga, ekzemple, por viroj (studentoj, knabskoltoj, k. t. p.): Lito kaj tri bonaj manĝoj ĉiutage ĉe apuda restoracio, 35 ŝilingoj por sep tagoj. Mendoj ne akceptotaj post 1 Junio.

La Kongresa Libro. (unika perilo por reklamado) estos sendata al Kongresanoj ĉirkaŭ la fino de Junio. Reklamojn (kosto po £4 por paĝo) oni sendu al S-ro W. M. Page, 31 Queen St. Edinburgh, ne pli malfrue ol 28 Majo. Ĝis nun aliĝis 363 personoj, en kies nombro estas 5 poloj.

Bibliografio

Bulgara Antologio (Prozo kaj Poezio) Kunmetis Ivan H. Krestanov, formato 14×21, 247 paĝ. Bulgara Esperanta biblioteko, Pirdop. Prezo por Pollando 3 50 orfrankojn.

Legante tiujn bone elektitajn, kaj bonstile verkitaĵojn pecojn el la bulgara literaturo, oni povas akiri sufiĉe vastan konon de la popola animo. Ĉiu speco estas montrita tie, versaĵe aŭ proze. Rimarkinda estas la kvanto de popolinstruistoj inter la verkistoj. Tiuj priskribas speciale la morojn kaj kutimojn popolajn, aŭ prikanthas la legendojn, la heroojn naciajn. Entuŝe interesa libro.

Infanara Internacia — Verda stiletto. Varvara Serisjeva, Bar-

naul. (Siberio). Formato 18×24 78 paĝ. Eldonis: T. Silva, Via Santa Maria alla Porla, 2, Milano, (Itallando). Libro verkita de virino, kiu amas kaj komprenas la infanan animon. Ilustraĵo estas adaptita al ĉiu vorto, rakontoj ilustritaj kvazaŭ kinobildoj. Facile estos lerni Esperanton l-ŭ tiu metodo, eĉ konsilinda al la plenaĝuloj, kiujn timigas la 16 gramatikaj reguloj. La libro estas bindita, ilustraĵoj kolorigitaj plejparte. Prezo ne montrita.

Ĉies Internacia Esperanta Stenografio. Dyba, Berlin-Niederschönhausen, Moltkestr. 4. Post jam multnombraj provoj por adapto al Esperanto la diversajn naciajn steno-metodojn, kaj elpenso de diversaj originalaj

steno-metodoj, tiu-ĉi ŝajnas interesa. Sed por stenografisto konanta iun nacian metodon, kaj ĝin praktikanta, estas facile uzi ĝin por stenografi en Es-

peranto. Kompare kun la Duploye, tiu-ĉi ŝajnas ne tro simpla.

E. F. C.

Ze ŝwiata esperanckiego.

Esperanto a nauka.

Towarzystwo rolniczo - zoologiczne (Institut zoologique, Bordeaux) na swem walnem zebraniu dn. 21 lutego b. r. powcieło następującą uchwałę:

Zebranie, zważywszy na wielką różnorodność języków, w których wydawane są dzieła i przeglądy naukowe, zważywszy na to, że Esperanto jest nader łatwym i odpowiednim językiem do tłumaczeń tekstów naukowych, że wartość tego języka okazała się w całej pełni w praktyce, postanawia, aby wszystkie naukowe prace i artykuły były conajmniej streszczane w pomocniczym języku Esperanto.

Esperanto i turystyka.

W ostatnich dniach ukazała się dość duża liczba przewodników w języku Esperanto (Federacia fervojaro Svisa, Centra Turisma Oficejo), po Zürichu, Genewie, Zoppotach, Wisbadenie.

Z Berlina informują nas, że wielkie biuro podróży „Mittel-europäisches Reise-Büro“ ustanowiło specjalną sekcję esperancką w celu sporzytkowania Esperanta w turystyce.

Esperanto a Radio.

82 radjo-stacje w 32 krajach

nadają bądźto kursy, bądźto przemowy esperanckie.

Niekompletna do tej pory statystyka wykazuje 660 tego rodzaju audycji, nadanych z 30 stacji. We wspomnianej statystyce brak jeszcze danych ze stacji w Pradze, Moskwie, Wrocławiu i tp.

Ważna decyzja poczty bułgarskiej.

Wykonując decyzję ostatniego kongresu Powszechnej Unji Telegraficznej, która przyjęła Esperanto jako „język jasny“, bułgarskie ministerjum poczt i telegrafu uznało specjalnym dekretem Esperanto za język jasny i możliwy do użytku na terytorjum Bułgarji.

Dn. 5 kwietnia Dyrekcja poczt specjalnym rozporządzeniem poleciła swemu personelowi studjowanie Esperanta.

Międzynarodowy Uniwersytet

Esperancki.

Podobnie jak w roku ubiegłym odbędzie się podczas powszechnego Kongresu esperanctystów w Edynburgu Letni Uniwersytet esperancki. Program podzielony został na 5 części: Folklorystyka i pieśni ludowe, lingwistyka, medycyna, nauka, prawo międzynarodowe.

Program obejmuje wykłady

znanych profesorów różnych narodowości, między innymi Prof. Collinson (Liverpool), Prof. Bujwid (Kraków), Dr. Pascal Deuel (Lipsk) i tp.

Sekcja folklorystyki posiada oratorów z pośród 7 narodów.

Esperanto na kongresie młodzieży

8-ci międzynarodowy kongres Ligi młodzieży (Ligue Internationale de la Jeunesse), który odbył się w Genewie dn. 1—5 kwietnia 1926 r., przyjął następującą rezolucję:

Zważywszy, że międzynarodowe stosunki są bardzo utrudnione różnorodnością języków; zważywszy na potrzebę przyjęcia jednego międzynarodowego języka neutralnego a łatwego; zważywszy, że Esperanto, rozpowszechnione i praktycznie używane w wielu krajach, odpowiada wszelkim potrzebom, Międzynarodowa Liga młodzieży poleca wszystkim swym sekcjom narodowym i członkom studjowanie międzynarodowego języka Esperanto.

Prelekcja o Polsce w Sorbonie

Znany i ceniony esperantysta p. Jan Kostecki, były wiceprezes Polskiego Towarzystwa Esperantystów, wygłosił w Sorbonie po esperancku odczyt na temat: „Upadek i powstanie Polski”. Redakcja „Esperantysty Polskiego” niniejszem wyraża szanownemu prelegentowi swe gorące gratulacje, z powodu tego, że wierny naszym ideałom, rozpowszechnia imię Polski za granicą.

Oficjalne egzaminy z jęz. Esperanto.

Ministerjum oświaty w Austrii dekretem z dnia 30 kwietnia 1925 r. ustanowiło Komisję egzaminacyjną esperancką. Wymieniona komisja rozpoczęła swe prace w ubiegłym listopadzie. Do egzaminów przystąpiło już 31 kandydatów, którzy uzyskali już dyplomy esperanckie. Ostatni egzamin odbył się podczas świąt Wielkanocnych.

W Niemczech istnieje już od 1922 r. „Instytut Esperancki” pod patronatem Ministerjum spraw wewnętrznych (departament oświaty) z komisjami egzaminacyjnymi we wszystkich prawie większych miastach republiki.

W Czechosłowacji i Brazylii istnieją już podobne komisje, ustanowione przez rząd.

Ciekawa propozycja.

200 studentów Uniwersytetu w Rio de Janeiro skierowało prośbę do Ambasady niemieckiej w Brazylii z propozycją, aby pewne dzieła niemieckie z zakresu medycyny były przetłumaczone na Esperanto dla użytku obcokrajowców.

Nauka mistrzów niemieckich, mówi petycja, jest niedostępna dla nas dzięki niewielkiej liczbie przekładów. Zważywszy wielkie trudności w studjowaniu języka niemieckiego, większość poważnych dzieł pozostaje nieznaną dla nas. Jedyną możliwość udostępnienia nam nauki niemieckiej jest tłumaczenie na Esperanto głównych dzieł, ponieważ wystarczy 20 lekcji, aby móc czytać i rozumieć wszystko, co napisane jest w tym godnym podzwu i łatwym języku.

Tira la gazetaro.

En N-ro 51 de „*Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio*“ ni legas pri tre interesa regularo de esperanto-ekzamenoj. La ekzamenoj estas dividitaj en kvar partojn: 1-e ekzameno pri kapableco, 2-e ekzameno pri scienca-pedagogia kapableco, 3-e ekzameno pri scienca kapableco, 4-e ekzameno pri kapableco por kursgvidado.

Nur el tiuj titoloj ni vidas, ke la ekzamen - problemo estas profunde pritraktita. Ni ankoraŭ revenos al tiu interesa temo.

Pri la 1-a la regularo diras: „La ekzameno devas doni al tiuj, kiuj deziras uzi Esperanton praktike ĉe sia profesia laboro, pruvon, ke ili scipovas esperante esprimi siajn pensojn en simpla parolo kaj korespondadi esperante“, pri la 2-a: „La ek-

zameno devas ebligi al tiuj, kiuj volas instui Esperanton en lernejoj, havigi al si ateston pri siaj konformaj povoj“, pri la 3-a: „La ekzameno devas al tiuj, kiuj utiligas Esperanton por scienca celo ebligi akiri pruvon, ke ili estas fundamente pritraktintaj Esperanton de scienca flanko“ kaj pri la 4-a: „La ekzameno devas al tiuj, kiuj intencas agi kiel kursgvidantoj, pruvi iliajn konformajn povojn“.

La diritaĵo estas la esenco de la regularo. Ni eldiras nenion opinion, lasante la aferon al pridiskuto des pli volonte, ĉar, se ni estas bone informitaj, la Centra estraro de la Pola Esperanto-Asocio nun ŝanĝos sian regularon pri ekzamenoj.

II Konkurso-enketo.

Krankam termino de la II konkurso jam forpasis, ni ricevis tre malmalte da respondoj. Ni opinias la konkurson tre grava, ĉar ĝi permesos al ni orientiĝi kia devas esti nia organo. Tial ni insiste petas ĉiajn niajn legantojn alsendi la respondojn al jenaj demandoj:

1. Kia fakto de nia gazeto plej plaĉas al Vi?

2. Kia numero laŭ Via opinio estas la plej bona kaj kial?

3. Kiajn faktojn ni devas ankoraŭ enkonduki kaj kiujn pli-grandigi?

4. Ĉu plaĉas al Vi la celado de la gazeto? Se ne, kia ĝi devas esti?

5. Kian fakon kaj kian numeron la plejmalto opinios la plej bonaj?

Premioj: 1) 2 libroj el jenaj: „Sinjoro Tadeo“ de A. Mickiewicz, „Lingvoj respondoj“ de L. L. Zamenhof, „Noveloj“ de H. Sienki-wicz, „Pola Esperantisto“ (antaŭ — aŭ postmilitaj). 2) Da belaj libroj aŭ dajara abono de „P. E.“. 3) Tatjara abono de „P. E.“. La nova termino por alsendo de la respondoj estas 1—VII—26 de k. j.

Ricevitaj gazetoj.

Academia pro Interlingua (Nr. 2), Oomoto (Pariza № 45), Balteno de Internacia Scienca

Asocio Esperantista, Libero (№ 8), Marto (№ 4, 5), Belga Esperantisto (№ 4), La Nova Tago (№ 1), Espero Ka-

tolika (№ 19), La Orienta Revuo (№ 4), La Fervojisto (№ 6, 7, 8), Revista del Ateneo (№ 21), Espero Teozofia (№ 2), La Suno Hispana (№ 107, 108), Itala Esperanta Revuo (№ 4, 5), Holanda Esperanto-Pioniro (№ 8), Oomoto (Japano, № 14, 15), La Movado (№ 86), Verda Meteoro (№ 3, 4, 5), Portugal Esperanto (marto), La Verda Lamo (№ 1), International Language (aprilo), La Interligilo de l'P. T. T. (№ 46, Heroldo de Esperanto (№ 26, 27, 28), Le Monde Espérantiste (Nr. 1, 2), Unione (Nr. 2), Konkordo (Nr. 3), Arbeiter Esperantisten (marto), Kataluna Esperantisto (Nr. 21, 22), La Revue de l'Univers, Bulgara Esperantisto (Nr. 8), Amerika Esperantisto (Majo), Verda Mondo (Nr. 4), Internacia Medicina Revuo (Nr. 3), Esperantista Junularo (Nr. 36), Germana Esperantisto (Nr. 5), La Semisto (Nr. 57, 58, 59), Roia (Nr. 27).

P. T. E.

P. E. A.

Komunikat № 2

Zarządu Centralnego Polskiego Tow. Esperantystów.

VII Kongres. Z powodu zajęć, które miały miejsce w Warszawie w bieżącym miesiącu, Zarząd Centralny Polskiego Tow. Esperantystów, na swem posiedzeniu w dniu 19 b. m. postanowił odroczyć VII Kongres Towarzystwa. Następny termin ustanowiony będzie na najbliższem posiedzeniu.

Sprawozdania Oddziałów. Zarząd Centralny przypomina zarządom wszystkich oddziałów Towarzystwa, że termin nadsyłania sprawozdań za kwartał drugi upływa z dniem 15 lipca. Do tej pory sprawozdań za kwartał pierwszy nie nadesłały oddziały w Zawierciu, Radomiu i Wilnie. Zarząd Centralny niniejszem wzywa wymienione oddziały do złożenia sprawozdań jeszcze w maju r. b.

Paszporty na 18-ty Powszechny Kongres. Członkowie Towarzystwa, którzy pragną otrzymać ulgowe paszporty na 18-ty Powszechny Kongres Esperantystów w Edynburgu, proszeni są o zgłaszanie się piśmienne do Zarządu Centralnego (Królewska 19, Warszawa) do dnia 15 czerwca r. b.

Zarząd Centralny.

Dum kunsido de Intersocieta Delegitaro de la Varsoviaj societoj oni petis s-ron Stanisław Essigman klopodi pri la pasportoj por 18-a Universala Kongreso. Partoprenontoj bonvolu anonci sin skribe al s-ro Stanisław Essigman, Warszawa, Marszałkowska 130.

Redaktoro kaj eldonanto: Stanisław Karolczyk.

Sekretario de la Red.: Mieczysław Trochimowski.

Presejo: Fratoj Wójcikiewicz, Warszawa, Pawła 10.

Nowe uzupełnione wydanie
**Kompletnego podręcznika
języka Esperanto**

Leo Turno, członka Komitetu językowego,
ukazało się już nakładem autora i jest do nabycia w cenie
Zł. 1.25 za egz. Wysyła się najmniej 5 egz. Przy zamówieniu
10 — 25 egz. udziela się 25% rabatu, 25 — 30 egz.
30% rabatu. 50 — 100 egz. 33 ¹/₃% rabatu. Wysyłkę
uskutecznią się po utrzymaniu należności na P. K. O.
Kraków, nr. 405.716 lub na adres:

LEOPOLD DREHER, Kraków, Starowiślna 37.

Kiu varbos 5 novajn abonantojn
ricevados nian organon
senpage dum la tuta jaro.

Ĉ I E S
Internacia
Esperanta
Stenografio

Korespondada skribo lernita dum 1 horo.
Raportista (2) parto enhavas mallongigojn grand-
parte laŭregule lerneblajn. Ĉiu parto 1 frankon
svisan aŭ samvaloron kaj sendkostojn antaŭ-
pagatajn.

(12 ekz. 10 fr. sv.)

Dyba, gimn. profesoro,
Berlin-Niederschönhauser, Moltkestr. 4.